Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

12-a de septembro 2021, numero 21

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Aperis nova numero de Kontakto

La 28-an de aŭgusto aperis nova numero de la revuo *Kontakto*, N 3 (2021). Membroj de TEJO kaj UEA povas elŝuti ĝin en la revua paĝo https://uea.org/revuoj (necesas ensaluti).

Per tiu ĉi numero Rogener Pavinski finas sian redaktoran laboron por la revuo. Ĝi daŭris 10 jarojn.




Ĝis la fino de la jarkolekto 2021 li restos en la rolo de vic-redaktoro por ke la transiro de taskoj okazu trankvile kaj sen damaĝoj al la revuo. Nova redaktoro de *Kontakto* estis elektita Paweł Fischer-Kotowski, kiu ekredaktas ekde la N 4. Legu pri tio en la Gazetara komuniko de UEA N 968 kaj la 12-a numero de *La Kolombo de Paco*.

La adiaŭan mesaĝon de Rogener vi povas legi en la retpaĝo de *Kontakto*: https://mallonge.net/h9.

Ni ankaŭ invitas vin legi intervjuon kun li, kiu aperis en la aprila numero de la revuo *Esperanto*.

La redakcio de la revuo *Esperanto* dankas al Rogener pro la multjara, fruktodona kunlaboro kaj deziras al li ĉion bonan, kaj novajn atingojn en la Esperanto-movado kaj ekster ĝi.

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo!
Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

## Kulturo – survojilo al Esperanto en Togolando

Adjévi Adjé

Profite la restadon en Togolando de Paula R., studentino en la Sevilja Universitato, Hispanio, kadre de Afrika Reto de Kolektiva Agado por la Lingva kaj Kultura Identecoj (ARKALKI), ni aranĝis dekon da interagaj aktivaĵoj, inkluzive prezenton de Esperanto kaj mallongajn lingvajn kursetojn, pri kultura, lingva dignecoj kaj rajtegaleco inter viroj kaj virinoj kun dua-, triagradaj lernejanoj kaj ankaŭ kun personoj kun universitata edukiteco en la finiĝantaj julio kaj aŭgusto 2021.

Ĉio ĉi povis okazi danke al informmaterialoj kaj esperantaĵoj ricevitaj antaŭe de Esperanto-France, subteno de la universitato de Seviljo pere de prof. Vicente Manzano-Arrondo, de UEA kaj kompreneble ankaŭ de lokaj fortoj. Al ĉiuj ni diras tie ĉi dankegon!

Menciindas, ke unu el tiuj interagaj aktivaĵoj eĉ koincidis kun la Esperanto-Tago la 26-a de julio. Do ni uzis la okazon por kunmanĝi ne nur inter esperantistoj, sed ankaŭ kun ne-esperantistoj en amika etoso.

La lasta interaga kunveno okazis sabate la 28-an de aŭgusto 2021. Ĝi kunigis plenkreskulojn de diversaj kulturaj horizontoj, kiuj kapablas teni debaton en lokaj lingvoj pri kultura kaj lingva problemoj. Triono de tiuj personoj estas ne-esperantistoj, sed lingvo-instruistoj en dua- kaj triagradaj lernejoj. La plimulto de ili jam komencis lerneti Esperanton.



Detalan artikolon pri la evento legu en la oktobra numero de la revuo *Esperanto*.

# AMO 77 eksponas nian junecon

Stefan MacGill

Tiu Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) venis al fino la 11.09.2021. Grava nova materialo lastmomente preparita donas surprizan enrigardon al la juna membraro de UEA – tamen videbla nur en la PDF.

Jen tre baza (sed valida) analizo pri la grado de rejunigo tra kvar plej signifaj kontinentoj:

Pri Afriko (52%) kaj Ameriko (37%).

| Kontinento | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | Proporcio | Landoj |
|---|---|---|---|---|
| Afriko | 98 | 51 | 52 % | 5 |
| Ameriko Latina | 516 | 193 | 37 % | 5 |
| Eŭropo | 1058 | 106 | 10 % | 5 |
| Azio | 574 | 55 | 9 % | 6 |

Konkludoj: Afriko ne surprizas. Tiu rezulto nur spegulas la demografion de la tuta kontinento. La bona pozicio de Latinameriko estas klarigebla grandparte per la mirinda sukceso de la hispanlingva kurso kaj la lerto de UEA enpreni ties kursfinintojn. Tio okazis precipe en Kolombio, Meksiko kaj Ĉilio.

Eŭropo havas mizeran rezulton (10%), kiun ni delonge scias. Sed la granda surprizo de la esploro estas la nejuna stato de nia azia movado (9%)! Neniu imagis, ke ĝi postrestus eĉ Eŭropon! Ni ĉiuj scias, ke de jardekoj Japanio eniris demografian krizon – la landon mem kaj nian movadon. Sed kiu imagis, ke Koreio kaj Ĉinio sekvas rapide malantaŭ ni. Azianoj ja havas mirindan kapablon aspekti pli junaj ol ili fakte estas (EKO povus citi multajn ekzemplojn J). Sed en la UK kaj ILEI-kongreso en Koreio en 2018 ni ŝajne dronis en maro de entuziasmaj junuloj. Kial ili ne vidiĝas? Same pri la Kongreso de ILEI en Kunming, suda Ĉinio.

Klare la AMO-programo devos urĝe okazigi seminarion en unu el tiuj tri landoj por trakti la temon de rejunigo de la komunumo kaj la membraro de UEA kaj TEJO. Ni jam eklaboras por starigi tion frue en 2022.

Por fari ene de du tagoj, ni devis elekti po kvin landojn el ĉiu kontinento – tiujn kun la plej granda nombro de individuaj membroj de UEA, sed zorgante pri bona trakontinenta distribuo. Por Azio ni allasis ses landojn.

Por Eŭropo, eble la sudajn landojn – Hispanio, Italio kaj aliaj, kiuj povos doni utilan gvidon. Surprizas Rusio. Kiel ili sukcesis atingi tiom bonan rezulton?

Por Azio nia sola espero estas rigardi al Filipinoj kaj Indonezio kaj similaj landoj.

TEJO nepre devas labori pri Azio kaj Eŭropo!

Kompreneble, membreco en UEA ne reprezentas la tutan komunumon, kiu tendencas esti pli juna. UEA kaj TEJO devas elpensi strategiojn por igi sin pli popularaj por junuloj!

Pri AMO 77 ni sendos pliajn materialojn per posta EKO-komuniko. Detaloj pri AMO 77, 78, 79, 80 kaj 81 sekvos tuj kiam estos alireblaj!

*El la EKO 38*

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

Por ricevi EKO-jn aldonu vin: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

| AFRIKO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Burundo | 43 | 30 | 70 % |
| Senegalo | 22 | 8 | 36 % |
| Togolando | 19 | 4 | 21 % |
| Tanzanio | 7 | 3 | 43 % |
| Ugando | 7 | 6 | 86 % |
| SUME | 98 | 51 | 52 % |

| AMERIKO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Brazilo | 285 | 57 | 20 % |
| Meksiko | 98 | 57 | 58 % |
| Kolombio | 79 | 57 | 72 % |
| Argentino | 37 | 14 | 38 % |
| Ĉilio | 17 | 8 | 47 % |
| SUME | 516 | 193 | 37 % |


| EŬROPO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Germanio | 399 | 26 | 6.5 % |
| Francio | 339 | 28 | 8.3 % |
| Hispanio | 147 | 23 | 15.8 % |
| Italio | 101 | 11 | 10.9 % |
| Rusio | 72 | 18 | 25.0 % |
| SUME | 1085 | 106 | 10 % |

| AZIO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Japanio | 238 | 9 | 4 % |
| Ĉinio | 136 | 16 | 12 % |
| Koreio | 80 | 5 | 6 % |
| Israelo | 53 | 6 | 11 % |
| Vjetnamio | 35 | 13 | 37 % |
| Irano | 32 | 6 | 19 % |
| SUME | 1085 | 106 | 9 % |

# Afrikaj virinoj retkunvenis

Miora Raveloharison,
Membro de la Afrika Komisiono de UEA

La 29-an de aŭgusto 2021, Esperantista Virina Asocio en Afriko (EVAA) organizis retrenkontiĝon sub la temo "Emancipiĝo de la esperantistaj virinoj en Afriko". Entute 12 personoj partoprenis el DR Kongo, Madagaskaro, Malio, Senegalo, Kanado, Nepalo, Brazilo, Germanio, Belgio kaj Togolando.




La etoso estis bona, interesa kaj aparte pro la kontribuoj de eminentuloj en Esperantujo kiel Ĵajro, kiu proponis al ni pri komerco, Helga Artistino, Heidi Goes parolis pri agrikulturo, Didier Apélété Agbolo (togolanda viro) konsilis nin pri mastrumado de projekto kaj John Huang, elstara Esperanto-komercisto pri bonaj medicinaj ajloj. Ĉiuj intervenis dum la Zum-renkontiĝo.

La retkunvenoj de EVAA celas roli kiel diskutejo, kie virinoj kaj aliaj interesatoj pri virinaj interesoj povas libere interparoli pri emancipaj aspektoj kaj aktivaĵoj favore al bona disvolviĝado de la afrikaj virinoj esperantistaj. La renkontiĝo estas malfermita al la publiko kaj ĉiuj estos bonvenaj aliĝi kaj partopreni. La venonta retrenkontiĝo ĉefteme enfokusiĝos pri komerco.

Tiu ĉi retrenkontiĝo okazis sub mia gvido kaj tiu de Alexandrine Omba. Decide ni, virinoj, volas ekmoviĝi agade pri komerco venontjare, ĉar ni kunlaboras unuavice por nia disvolviĝo.

# La septembra Esperanto-Sumoo

Hori Jasuo

En la korona erao Esperanto-Sumoo estas la plej bona rimedo por lernado kaj movado de Esperanto. Tuj sendu vian aliĝon al mi.

Baldaŭ la septembra sumoo (la 71-a Sumoo) komenciĝos la 12-an de septembro (du semajnoj). Mi atendas vian aliĝon.

**Sendu jenajn datumojn:**

1. Viaj sumoo-nomo kaj vera nomo kun sekso
2. Libro, kiun vi legos
(1) Titolo (2) aŭtoro (3) eldonejo
3. Kiom da paĝoj vi legos por unu tago

Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

**Bonvolu varbi viajn konatojn al la sumoo!**



# Kunpens(ig)ado pri Esperanto kaj Universitatoj

La "Laborgrupo pri Esperanto en Universitatoj" de ESF/UEA/ILEI/TEJO kun IrEA okazigas:

**Kunpens(ig)adon pri Esperanto kaj Universitatoj (La 20-a sesio)**

Ni bonvenigas partoprenadon de ĉiuj interesatoj!

Lunde, la 13-an de septembro 2021, je la 13:30 laŭ UTC.

**Temo:** *De Internaciaj Korespondaj Esperanto-Universitatoj ĝis Internaciaj Virtualaj Esperanto-Universitatoj – Ĉu ĉio nur fantazio? Kial ne okazas io?*



Kun gvidado de Prof. Renato Corsetti, venu por diskuti pri tio kaj vidi kion ni povas plenumi por pli efike vigligi Esperanton en la universitatoj tra la tuta mondo!

La kompletajn registraĵojn de la antaŭaj sesioj vi povas spekti en la jutuba kanalo de UEA: https://mallonge.net/ha kaj la retejo de IrEA: https://mallonge.net/hc.

Ĝis nun multaj aktivuloj el tre diversaj landoj partoprenis la sesiojn de la Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj, i.a. kaj ekzemple, geprofesoroj Ilona Koutny, Nina Daniljuk, Gong Xiaofeng (Arko), Humphrey Tonkin, Renato Corsetti, Orlando Raola, Federico Gobbo, Dennis Keefe, Vincente Manzano-Arrondo, Byelongo Elisee Isheloke, Francesco Maurelli, Amri Wandel, Ivan Colling kaj Giridhar Rao.




Ekde la projekto de Internacia Koresponda Universitato Komenio (Comenius) en la 1980-aj jaroj ĝis la hodiaŭaj projektoj pri Internacia Reta Esperanto-Universitato. Ni invitas ĉiujn partopreni niajn Kunpens(ig)adojn pri Esperanto kaj Universitatoj, i.a. kaj speciale aktivulojn el la koncernaj establoj kiel diverslandaj universitatoj kaj altlernejoj: ĈEL, AIS, IKU (ISU), E@I, CED, ESF, ILEI, UEA, TEJO, KAEST...




Sekvu detalojn pri la evento ĉe EventaServo: https://eventaservo.org/e/0dabc3

## Aperis la septembra numero de la revuo *Esperanto*




### La enhavlisto de la septembra numero:


171 | Salutletero de Unesko
171 | Kiam Unesko agnoskos la Internacian Tagon de Esperanto?
174 | Unesko devas agnoski la Internacian Tagon de Esperanto pro 11 faktoj
176 | La Amsterdama Katedro kaj la scienca Virtuala Kongreso
178 | Virtuala Kongreso: Premio Deguĉi 2021 al Stefan MacGill
179 | 14 elstaraj agantoj diplomitaj dum la 2-a VK
180 | Kiu estas Walter Poppeck en la Korea Esperantisto?
181 | Faka agado: Unua diplomo pri „Elstara Lingvo-servo en Hospitalo" transdonita
182 | La Kongresa Temo de la 2-a VK
183 | Virtuala Kongreso: Enkonduko al la Kongresa Temo
185 | Afriko brilas: Vizitoj al kluboj de Esperanto en Burundo
186 | UEA: UEA survoje al financa resanigo
187 | Oficiala Informilo
188 | Landa agado: Jules Verne kaj Esperanto en Nantes
189 | Esperanto en universitatoj: Du junaj esploristoj ricevis stipendiojn Marjorie Boulton
190 | Afriko brilas: Ek al la 8-a Afrika Kongreso!
191 | Virtuala Kongreso | Opinio: Post la Kongreso
191 | Forpasoj